WIKIPEDIA

Oseta lingvo

publikigita versio estis patrolita je *25 jun. 2019*. Estas kontrolendaj ŝanĝoj de ŝablonoj/dosieroj.

Ŝanĝoj al ŝablonoj aŭ dosieroj en ĉi tiu versio estas kontrolendaj. La stabila versio estis patrolita je *25 jun. 2019*.

La oseta lingvo (osete *ирон æвзаг* [iRON avĴAG]) estas parolata ĉefe en Nord-Osetio kaj Sud-Osetio (kie ĝi estas rekonita oficiala lingvo), signifaj diasporoj ekzistas ankaŭ en Moskvo, Peterburgo, Toronto kaj kelkaj aliaj grandaj urboj de la mondo. Entute estas ĉirkaŭ 600 mil parolantoj (laŭ aliaj pritaksoj, estas eble ne pli ol 400 mil fluparolantoj).

La lingvo apartenas al irana grupo de hindoeŭropaj lingvoj (orient-irana grupo, al kiu apartenas ankaŭ la paŝtua (aŭ *puŝtua*) en Afganio, la jagnoba en Taĝikio kaj kelkaj aliaj). Multaj iranistoj uzis la osetan lingvon por deĉifri nomojn de eminentaj scitoj, kiuj restis en antikvaj priskriboj de la regiono. Ekzistas firmaj etimologiaj kaj historiaj pruvoj de iamaj kontaktoj de osetlingvanoj kun slavaj, finno-ugraj kaj tjurkaj gentoj. Multo venis al la lingvo jam de kaŭkazia ĉirkaŭaĵo.

Oseta lingvo	
ирон æвзаг [iRON avĴAG]	
Parolata en	Rusio, Kartvelio, Sud-Osetio[1], Turkio
Parolantoj	599 250
Denaskaj parolantoj	600 000
Fremdlingvo / dua lingvo por	ĉ. 10 000
Skribo	Cirila alfabeto kun kelkaj aldonoj
Lingvistika klasifiko	
Hindeŭropa lingvaro	
Hindirana lingvaro	
Irana lingvaro	
Orient-irana lingvaro	
Nord-orient-irana lingvaro	
Oseta lingvo	
Oficiala statuso	
Oficiala lingvo en	Nord-Osetio, Sud-Osetio
Lingva statuso	2 vundebla
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	os
ISO 639-2	oss
ISO 639-3	oss
Glottolog	osse1243
Angla nomo	Ossetian
Franca nomo	ossète
Vikipedio	

Enhavo

Gramatiko

Sistemo de skribo

Dialektoj

- La irona dialekto
- La digora dialekto
- La literatura formo de la oseta

Literaturo-Beletro

Esploroj

Vidu ankaŭ

Referencoj

Eksteraj ligiloj

Gramatiko

La oseta sonsistemo, vortprovizo kaj eĉ gramatiko estis grave influita de ibero-kaŭkaziaj kaj tjurkaj lingvoj. Tiel en la lingvo aperis 9 kazoj (malgraŭ la ĝenerala tendenco de iranaj lingvoj simpligi deklinacion), vortoj *къух* (proksimume "kuĥ") kaj *къах* ("kaĥ") por brako kaj gambo paralele kun hindoeŭropaj *арм* ([arm] mano) kaj *фæд* ([fad] piedo). En la sonsistemo aperis specife kaŭkaziaj glotaj okluzivaj konsonantoj, formiĝante triopojn "voĉa-senvoĉa-glota": d - t - t', b - p - p', d - t - t', dz - c - c' ktp. Same stranga por hindoeŭropa lingvo estas uvula sono [q], renkontebla interalie en la araba *qalbī* ("mia koro") kaj *Qaddafi*, en pluraj tjurkaj lingvoj (ne en la turka mem) kaj en la ajmara.

La kovrilo de la plej fama poemaro de K'osta ĤETAGUROV: "Oseta Liro". Literoj de la unua alfabeto fare de ŜOGREN (Sjögren)

En la literatura varianto de la oseta lingvo estas 35 fonemoj: 7 vokaloj, 2 duonvokaloj kaj 26 konsonantoj.

La akcento estas dinamika; ĝi estas ĉiam sur la unua silabo, krom la kazoj kiam en ĝi estas "malforta" vokalo (æ aŭ ы) — tiukaze la akcento estas sur la dua silabo. Vortoj formas sintagmojn en la oseta, kaj akcenton havas ĉiu sintagmo, ne ĉiu vorto. La digora dialeko (vidu "Dialektoj") havas pli komplikan akcentadon.

La oseta havas restojn de la gramatikaĵoj por marki difinitecon: en la digora dialekto restis difinita artikolo *i* ("la"), dum en la irona dialekto akcento povas veni al la unua silabo kun malforta vokalo (kvazaŭ antaŭ ĝi estus ankoraŭ unu malforta silabo, kiu estis la artikolo iam), se temas pri difinita objekto, pri kiu la parolantoj scias.

La oseta havas riĉan kaj vivan vortforman sistemon, kreante novajn vortojn ĉefe per kunmeto de radikoj kaj aldono de sufiksoj (multe pli malofte prefiksoj). Malgraŭ abundo de rusaj pruntoj, la oseta estas relative purisma lingvo, kompare al la aliaj minoritataj lingvoj de Rusio, kun sufiĉe multaj neologismoj trafe kreitaj per propraj morfemoj.

Sistemo de skribo

Ĉi tiuj tabeloj montras la osetan alfabeton, unue la modernan cirilan kaj due la malnovan latinan:

Moderna cirila alfabeto

Letero	А	Æ	Б	В	Г	(Гу)	Гъ	(Гъу)	Д	Дж	Дз	Е	З	И	Й	К	(Ку)	Къ	(Къу)	Л
	а	æ	б	в	г	(гу)	гъ	(гъу)	д	дж	дз	е	з	и	й	к	(ку)	къ	(къу)	л
IFA	a	ə	b	v	g	gʷ	ʁ	ʁʷ	d	d͡ʒ	d͡z	e	z~ʒ	i	j	k	kʷ	kʼ	kʷʼ	l
Letero	М	Н	О	П	Пъ	Р	С	Т	Тъ	У	Ф	Х	(Ху)	Хъ	(Хъу)	Ц	Цъ	Ч	Чъ	Ы
	м	н	о	п	пъ	р	с	т	тъ	у	ф	х	(ху)	хъ	(хъу)	ц	цъ	ч	чъ	ы
IFA	m	n	o	p	pʼ	r	s~ʃ	t	tʼ	u, w	f	χ	χʷ	q	qʷ	t͡s	t͡sʼ	t͡ʃ	t͡ʃʼ	ɨ

Latina alfabeto (uzita de 1923 ĝis 1937)

Letero	A	Æ	B	C	Ch	Č	Čh	D	Dz	Dž	E	F	G	Gu	H	Hu	I	J	K	Ku
	a	æ	b	c	ch	č	čh	d	dz	dž	e	f	g	gu	h	hu	i	j	k	ku
IFA	a	ə	b	ts	tsʼ	t͡ʃ	t͡ʃʼ	d	d͡z	d͡ʒ	e	f	g	gʷ	ʁ	ʁʷ	i	j	k	kʷ
Letter	Kh	Khu	L	M	N	O	P	Ph	Q	Qu	R	S	T	Th	U	V	X	Xu	Y	Z
	kh	khu	l	m	n	o	p	ph	q	qu	r	s	t	th	u	v	x	xu	y	z
IFA	kʼ	kʷʼ	l	m	n	o	p	pʼ	q	qʷ	r	s~ʃ	t	tʼ	u, w	v	χ	χʷ	ɨ	z~ʒ

Dialektoj

Estas nur du dialektoj en la oseta: la digora, en kiu parolas proksimume unu sesono de la tuta popolo, kaj la irona. Digoroj kaj ironoj iom malfacile komprenas unu la alian, sed post iom da praktiko problemoj malaperas.

Digoroj ofte komprenas kaj ĝis iu grado parolas la ironan, sed ne male.

Sociolingvistoj konstatas, ke plej ofte parolantoj de la diversaj dialektoj elektas la rusan por kompreni unu la alian.

La unua numero de osetlingva ĵurnalo «Rastdzinad», 14-a de marto 1923

La irona dialekto

La irona havas tri subdialektojn: la norda (plejmulto de parolantoj), la kudara (plejmulto el loĝantoj de Sud-Osetio, ankaŭ ne-osetoj) kaj la *ksana* aŭ *ĉisana* (disvastiĝinta ĉe bordoj de rivero Ksani, sed cedanta nun al la kudara).

La digora dialekto

En la unuaj jaroj de sovetia potenco la digora estis konsiderata aparta lingvo. En ĝi estis publikigitaj lernolibroj, literaturaj verkoj ktp., sed en la 1930-aj jaroj la digora literatura tradicio estis nomita "kontraŭrevolucia" kaj ekde tiam neniam vidis novan disfloron. Lastatempe la laboro en tiu direkto reaktiviĝis: eldonatas semajngazeto "Digora" kaj literatura revuo "Iraf" en la digora, aperis ŝtate subtenata Digora Teatro. Konstitucio de Nord-Osetio agnoskas la osetan lingvon "en ambaŭ ĝiaj formoj — la irona kaj la digora", kio iĝis fakte nova jura agnosko de la digora post multaj jaroj de neglekto.

Kutime digoroj estas *trilingvaj* — ili bone parolas sian dialekton, la rusan kaj la literaturan osetan.

La literatura formo de la oseta

La literatura oseta lingvo (lingvo de radio, televido, instruado ktp.) formiĝis surbaze de la irona dialekto (kun kelkaj leksikaj pruntoj el la digora).


Binontæn se'ngomdzinad se'fsinyl bast u.
Biræh artæj tærsy.
Biræhy mard qyg nikæmæn væjjy.
Biræh kuy næ uaid, uæd fijjau dær næ qæuid.
Biræhæn sæhy meqq xudyn.
Biræhæj xæjræg dær tærsy.
Biræhau kuy fyr æfsæst, kuy fyr stong.
Biræhy jæ khæxtæ æfsadync.
Biræh jæ xæstæ jæ carmæj bafidy.
Biræhæj či tærsy, uj qædmæ næ cæuy.
Biræh birægæjttæ nyjjary, aftæmæj jæ myggag cybyr u.
563

Parto de paĝo kun oseta teksto en latinida alfabeto. El libro pri folkloro eldonita en 1935

Ĝis nun restas nesolvita problemo pri ortoepio (prononc-reguloj) de la literatura oseta lingvo: antaŭe agnoskitaj reguloj baziĝas sur fakte malpopulariĝinta prononc-normo, kiu tamen plu estas uzata kaj instruata en Sud-Osetio. En Nord-Osetio oni prononcas la literaturan lingvon fakte laŭ la plej disvastiĝinta (plej uzata) maniero. Temas pri regulaj diferencoj kiel en la vorto *цæдис* ("unio"), kiu estas prononcata:

- [caDIS] laŭ la malnova literatura normo (plu instruata en Sud-Osetio kiel normo) kaj en kelkaj vilaĝoj laŭ la loka prononcado;

- [saDIŜ] laŭ la nova literatura normo de la Nordo (kaj ankaŭ laŭ la uzata en plejmulto de lokoj prononco);
- [ŝaDIS] laŭ la plej populara prononco de Sud-Osetio (ankaŭ prononco de Ĉhinvalo, la ĉefurbo).

Kvankam en la literatura lingvo aperas du tagĵurnaloj («Rastdzinad» en la nordo kaj «Ĥurzarin» en la sudo), kvankam oni eldonas librojn kaj instruas la lingvon en mezlernejoj, sociologiaj sondoj montras altan nivelon de analfabeteco inter la parolantoj de la oseta (ne pli ol 20% de osetparolantoj kapablas skribi la lingvon laŭ la reguloj). Tion influis vastiĝo de uzo de la rusa lingvo, interalie en edukado. Nun okazas preparado por refondo de dulingva instruado, kun agnosko de la fakto, ke en Vladikavkaz por multaj junaj osetoj la unua kaj pli bone parolata lingvo jam estas la rusa. Jam kelkaj eksperimentaj klasoj studas laŭ la nova programo, kun pli profunda lernado de la oseta kaj studado de apartaj studobjektoj en la oseta.



Oseta teksto en kartvelida alfabeto. Antaŭparolo de libro pri folkloro eldonita en Stalinir (nun Ĉhinval), eldonjaro 1940

Literaturo-Beletro

La fondinto de la oseta literatura tradicio estas konsiderata talenta poeto Konstantin (K'osta/*Къоста*) ĤETAGUROV (*Xetagkaty*). Inter verkoj de K'osta estas multaj popolaj fabloj kaj legendoj, kiujn li rerakontis rime. Preskaŭ samtempe kun Ĥetagurov, en la komenco de la 20-a jarcento verkis kelkaj aliaj osetlingvaj verkistoj (Arsen Kocojev, Seka Gadijev ka.), kies verkoj hodiaŭ iĝis klasikaj.

La oseta literaturo spertis sian disfloron inter la du mondmilitoj, malgraŭ la fakto, ke literaturo tiam estis neeviteble ideologia. Lastatempe oni parolas pri krizo de oseta literaturo kaj libroeldonado; eldonkvanto de novaj literaturaĵoj malofte estas super 500.

Esploroj

Esplorado de la oseta lingvo ekhavis sian fundamenton en la 18-a jarcento, kiam vojaĝantoj verkis siajn impresojn pri vizitoj en Osetion. Inter ili N. Vitsen, I. A. Guldenstedt, J. Reineggs. La plej grava kontribuo iĝis verko de germana orientisto von Klaprot „Vojaĝo en Kaŭkazio kaj Kartvelio“ (eldonita en 1812). Von Klaprot estis la unua por eldiri supozon pri genealogia ligiteco inter la oseta kaj la alana lingvoj kaj difinis la digoran idiomon kiel dialekton de la oseta lingvo, sed ne aparta lingvo.

Inter la plej famaj esplorintoj de la oseta lingvo estas:

- Andreas Sjögren (kreinto de la unua alfabeto, 19-a jarcento),
- Vsevolod Miller (aŭtoro de la "Осетинские этюды"/"Osetaj Studoj"),
- Vaso Abajev (i. a. aŭtoro de la 4-voluma "Histori-etimologia vortaro de la oseta lingvo", 1957-1989).

Vidu ankaŭ

Magomet Isajev

Alanoj

Lingvistiko

Listo de lingvoj

Lingva familio

Referencoj

1. ↑ Sud-Osetio estas fakte memregata teritorio kun administracia centro en Ĉĥinvalo, sed ĝia statuso kiel sendependa ŝtato estas agnoskita nur de kelkaj aliaj neagnoskitaj ŝtatoj kaj de Rusio (2008).

Eksteraj ligiloj

Esperanto-oseta vortaro por ĉirkaŭ 3 mil vortoj en Multizaurus (http://poliglos.info/inter/any.php?from=esn&into=oset&ifc=esn)

Vjaĉeslav (Slavik) Ivanov : Kaŭkazio : La oseta lingvo (https://www.monato.be/2003/007865.html), *Monato*, 2003/01, p. 24.

«Осетинский язык он-лайн». Aro de materialoj por studantoj de la oseta (http://ironau.ru) (ru, en, fr)

Oficialaj lingvoj de Rusio	
Tutŝtata oficiala (ŝtata) lingvo	rusa (→)
Lingvoj oficialaj (ŝtataj) en federaciaj subjektoj	abaza · avara · agula · adigea · azerbajĝana · sudaltaja · baŝkira · burjata · dargva · inguŝa · kabarda-ĉerkesa · kalmuta · karaĉaja · komia · kumika · laka · lezga · nogaja · maria · mokŝa · oseta · rutula · tabasarana · tatara · tata · tuva · udmurta · ĥakasa · caĥura · ĉeĉena · ĉuvaŝa · erzja · jakuta
Lingvoj kun oficiala statuso	vepsa · dolgana · kazaĥa (→) · karela · komipermjaka · mansa · neneca · selkupa · finna · ĥanta · ĉukĉa · evenka · evena · jukagira

Lingvo	
	Lingvistiko • Interlingvistiko • Planlingvo • Lingvaj familioj • Lingva filono • Senparenca lingvo
Listoj	alfabetorde • laŭ ISO 639 • laŭ familio • laŭ parolantaro • laŭ skribsistemo
Diverslingve	nombroj • Saluti • danki • idiotismo kaj idiotismaj esprimoj

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Oseta_lingvo&oldid=6654140"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 15:21, 25 jun. 2019.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.